halle-saale
@esperanto.de

Panoramo-Info

Sciiga letero por la Esperantistaro en Saksio-Anhalto

15-a jarkolekto 2006-1

26-an de aŭgusto 2006: REVO-Renkontiĝo Esperantista en VorlicO

La ĉijara renkontiĝo
en la parko de Vorlico (Wörlitz) okazos
la 26-an de aŭgusto 2006 (sabato).
Ni renkontiĝos 10:00h
ĉe la urbodomo de Wörlitz.

Rousseau-insulo kun novaj poploj

Ekde nelonge la ĉefa simbolo de la parko de Vorlico denove brilas post renovigado. La Rousseau-insulo ricevis novajn poplojn (lombardaj nigraj poploj, *Populus nigra* 'Italica'). Ĉu ankaŭ la alegoria labirinto estas trairebla? Ni ne scias, ni vidos – tamen ne tiom gravas, ĉar en la parko de Vorlico ne mankas interesaj objektoj kaj ravaj rigardoj. Ĉifoje nia celo estas simile unike kiel ĉe nia jubilea aranĝo (20a REVO en 2004).

la Gotika Domo

Tiam ni vizitis la ĉefan kastelon. Nun ni volas viziti la Gotikan Domon. Ĝi estis la rifuĝejo de princo Franz *(pron. Franc)*, kie li povas okupiĝi pri pomologio en la trankvilo de la naturo. Alia interesa unikaĵo de la Gotika Domo estas la pentraĵaj fenestroj. Ili estas bildrakonto pri la svisa historio. Princo Franz akiris la artajn vitraĵojn, kiam oni forigis ilin el la preĝejoj de Svisio. Multaj svisoj vizitas la parkon por vidi tiujn unikaĵojn. Maldekstre vi vidas bildon de la Gotika Domo, kiel ĝi aspektas de la ĝardena flanko (Tudor-gotika stilo). La alia flanko montras malsaman gotikan stilon (italan gotikon). La arkitekto Erdmannsdorf konstuis kelkajn tiajn diversflankajn konstuaĵojn (ekz. la Someran Salonon ĉe la kastelo aŭ la gastdomon en la parko Georgium en Dessau). Venu al Vorlico por ĝui kun ni tiun unikan parkon. En la jaro 2000 UNESCO deklaris la parkon *Mondkulturan Heredaĵon*)

Se vi bezonas pliajn informojn, demandu la Esperanto-grupon Panoramo
(kontakteblecoj sur la lasta paĝo).

jogo

Albert Ebert (1906-1976)

Floranta leontodo (1970)

Hodiaŭ ni prezentas pentriston, kiu famas en Halle sed verŝajne estas tute nekonata ekster la regiono.
Antaŭ 100 jaroj, la 26-an de aprilo, naskiĝis Albert Ebert. Lia patro estis masonisto. La urbon Halle kaj ĝian ĉirkaŭaĵon li ĉiam komprenis kiel mondon de beleco kaj mirakloj – tion esprimas ankaŭ liaj postaj pentraĵoj. En la jaro 1921 li estis trapasinta la bazan lernejon kaj komencis lerni la profesion de masonisto, sed li ne finis la porprofesian lernadon. Ĝis 1939 li havis diversajn laborojn: portisto de mebloj, helpanto en foiro, konstrulaboristo. Ekde la komenco de la dua mondmilito li estis soldato. En la jaro 1943 li estis lezita dum batalo. En la hospitalo li komencis pentri. Tiel ekestis lia unua pentraĵo (portreto pri li mem). Ĉe tiu pentraĵo oni ne rimarkas, ke li ne ricevis edukon pri arto. Tiam li estis 37-jara. Post la milito li decidis pli ofte pentri.

"Mi volis pentri kaj mi volis montri la mondon tiom bela kiel mi perceptas ĝin."

Ekde 1946 li studis du semestrojn ĉe la altlernejo pri arto kaj desajno "Burg Giebichenstein" en Halle. Liaj instruistoj estis la profesoroj Charles Crodel kaj Waldemar Grzimek. Unue Charles Crodel ne volis lasi lin studi ĉe la altlernejo pro lia alta aĝo. Aŭdinte tiun argumenton Albert Ebert replikis al la profesoro: Kiom aĝa oni estu por fariĝi pentristo? La rezulto estis: Albert rajtis studi. En la jaro 1947 li laboris en diversaj profesioj. Unu jaron poste li kunverkis ĉe la landa galerio de Saksio-Anhalto kiel restaŭristo. Dum la 50-aj jaroj (1954 ĝis 1956) li estis hejtisto en la altlernejo Giebichenstein kaj konstrulaboristo en la urbo Halle. Per subteno de amikoj kaj stipendio de CDU (la partio kristdemokrata unio) li povis libere labori kiel artisto. Lia unua ekspozicio en la jaro 1957 havis grandan sukceson.
La mondo de Ebert estas riĉa kaj varia, kun belaj virinoj, infanoj, lampionoj, festoj, katoj, dancantaj neĝeroj kaj la lumoj de la urbo Halle. Li pentris nur dum la nokto; tiel li kreis ĉirkaŭ 1000 pentraĵojn dum la 30 jaroj de lia verkado. Multaj liaj pentraĵoj estas malgrandaj. Li nomis ilin "miaj infanoj". Li pentris ankaŭ pri religiaj temoj. Tiaj bildoj ne plaĉis al la reganta socialista partio de GDR. Li estis eksmembrigita el la partio.
Jam 60-jara li eklernis novan teknikon: litografadon. Sur lia unua litografa paĝo li konstates: La komenco de io ajn estas malfacila. Tamen li pli kaj pli eksperimentis pri tiu tekniko dum la lastaj jaroj de lia vivo.
En la jaro 1973 la urbo Halle honoris lin per la artpremio de la urbo. Okula malsano malebligis al li la pentradon ekde 1975. Okaze de lia 70a naskiĝtago la fondaĵo Moritzburg dediĉis al li ekspozicion, kiun li ankoraŭ povis ĉeesti. La 21-an de aŭgusto 1976 Albert Ebert mortis.


Leda kun la cigno (1957). krajono

Dum vizito en Halle vi trovos kopiojn de liaj bildoj en multaj urbaj muzeoj kaj galerioj.

jogo

Migrado tra la arbaro Domholz

La 20-an de majo 2006 okazis nia tradicia promenado tra la arbaro Domholz. Kiel kutime ni komencis nian vojon en Schkeuditz, kiel kutime ni havis bonan veteron kaj kial kutime ĉiuj ĝuis la verdan naturon inter kanalo kaj rivereto. Venis E-istoj el Lepsiko (kaj el la ĉirkaŭaĵo de Lepsiko), el Halle, Dresdeno kaj Magdeburgo. Tiel estis bona miksaĵo el "malnovaj leporoj" kaj novuloj. Bedaŭrinde nia kutima celo, la restoracio Domholzschänke, ne povis gastigi nin dum tagmanĝo. Antaŭ kelkaj jaroj la restoracio forbrulis, poste estis proprovizora instalaĵo por servi manĝaĵojn kaj trinkaĵojn al la gastoj. Ĉijare oni konstruis belan novan domon, kiun oni

malfermis dum la semajno post nia migrado. Bonŝance ni jam antaŭe sciis, ke ni bezonis alian manĝejon. Ni elektis la restoracion Schlobachshof, kiu estas proksima al nia kutima ripozejo. Ĝi estus eĉ pli proksima, se oni kaptus la ĝustan vojon al ĝi. Posttagmeze finiĝis nia aranĝo kaj iom poste ankaŭ finiĝis la bona vetero.
Mi jam antaŭĝojas la sekvan jaron, kiam ni povos viziti la kutiman, sed nun tute novan restoracion Domholzschänke.

jogo

Eksponaĵoj pri famkonataj lernantoj

Sub la slogano **kreskos en bono** (Es werde im Guten wachsen) oni prezentis ĝis 15a de majo notatestojn, pentraĵojn, librojn kaj aliajn notojn de ses famkonataj personoj en la fondaĵo de Francke en la iama legosalono de la biblioteko. Estis (kaj –as) ĉiuj personoj, kiuj lernis en la fondaĵo. Oni povas rigardi aĵojn de la regna kanceliero Bernhard von Bülow, de la kantisto Ivan Rebroff, de la kronikisto de Halle Johann Christoph von Dreyhaupt, de la poeto Gottfried August Bürger kaj de la ĝarden-arkitekto Hermann von Pückler-Muskau.
Pückler-Muskau venis 11-jara al Halle. Li ne estis tre bona lernanto. En la fako Literaturo li ricevis “eksterordinaran mallaŭdon”, la manskriba dokumento troviĝas sub vitro kaj estas datita de la 18. de oktobro 1796.
Von Bülow estis, en kontrasto al Pückler-Muskau, tre bona lernanto, sed ankaŭ li rivevis punon. Li helpis kunlernanton dum la ekzameno, pro kio li rcevis kelkajn horojn en karcero.
De Dreyhaupt estas rigardi letero al Gotthilf August Francke, en kiu li disputas pri medikamento de la apoteko de la orfejo.
En la tempo de1945 ĝis 1950 la kantisto Ivan Rebroff vizitis la superan lernejon por knaboj en la fondaĵo de Francke kaj kantis en la famkonata urba koruso por knaboj Halle (Stadtsingechor Halle).

ugg



Festotagoj de Saksio-Anhalto

De 14a ĝis 16a de julio 2006 okazis en Halle la festotagoj de la federacia lando Saksio-Anhalto. Tio estas bona ebleco por ĉiuj urboj kaj aocioj de la lando prezenti sin. Gerhard Hirschmann ĉion bone preparis por ke ni ricevas lokon en la standon de la asocio Auslandsgesellschaft Saksen-Anhalt (asocio pri internaciaj rilatoj). Tiu asocio (krom aliaj projektoj) ĉiujare okazigas grandan internacian renkontiĝon por junuloj (10- ĝis 15-jaraj) en Güntersberge.
La ĉirkaŭantaj standoj havis similan internacian karakteron: asocioj pri amikecaj kaj turismaj rilatoj al Finnlando, Vjetnamio, Pollando, ...
Kelkajn interesiĝantojn ni povis informi Esperanto kaj pri Moncivitaneco. Sed ankaŭ gravas la kontakto al la organizantoj de la aliaj asocioj/projektoj.

jogo

Radio Corax: Esperanto-elsendo havas novan lokon

Jam ekde kelkaj monatoj la nekomerca radioprojekto „Radio Corax“ denove regule elsendas en kaj pri Esperanto. La nova loko estas la dua dimanĉo de ĉiu monato de 11:00h ĝis 12:00h. Ripetaĵo de tiu elsendo sekvas 10 tagojn poste (merkrede) je 17:00h.
La elsendo enhavas instumentan muzikon kaj raportetojn pri la E-mondo, lingvopolitiko kaj etajn E-lingvajn konsilojn por turistoj. La nun eĉ dufojan elsendon ni dankas al niaj nelacigeblaj „radiologoj“ Achim Kaufhold kaj Udo Birkner.
Radio Corax estas akirebla en la urbo Halle kaj la ĉirkaŭaĵo per la frekvenco 95,9 Mhz. La hejma paĝo de la projekto estas **http://www.radiocorax.de**
Tie vi trovas ligon al la programo kaj al la reta elsendado (livestream). Per la reto vi havas pli bonan kvaliton. La reta elsendo estas havebla per la adreso Por ĉiu baza komputila sistemo ekzistas senkosta programo por aŭskulti retan radion. *http://212.122.41.133:8000/corax.ogg*

jogo

Halle, aspiranto por kultura ĉefurbo.

Halle ĉe Saale, 1200-jara urbo, aspiris pri la titolo Kultura Ĉefurbo de Eŭropo en la jaro 2010. Ĉar ne nur Halle aspiris, sed ankaŭ multaj aliaj urboj (nur el Germanio estas 13), ĵurio vizitas ĉiujn aspirantojn. Kun malfruiĝo alvenis la membroj de la ĵurio en Halle en kafejon „Skyline“, la starto por rondirado tra nia urbo. Ili vizitis la centran placon, la dominikanan preĝejon, la „kulturan insulon“ (kun teatro, galerio, kafejo ktp.) kaj la burgon Moritzburg. Ili vizitis ankaŭ la fondaĵon de Francke, - nur la „kulturvendejon“ ili ne vizitis pro tempaj problemoj.
Tiu kulturdomo estis ankaŭ celo de nia PIKO-ekskurso (24.01.2006). Post kiam ni vizitis tiun domon kaj rigardis la tri etaĝojn, mi estas certa, ke la tempaj problemoj de la membroj de la ĵurio estis por la aspiro de nia urbo tre granda feliĉo. Post la vizito mi estis seniluziigita pri tiu domo. Ĝi ne plenumas, kion ĝi promesis!
Unu de la gvidantoj tra la urbo por la ĵurio estis la iama ministro pri eksterlandaj aferoj Hans-Dietrich Genscher. Sed ankaŭ la ĉefurbestrino Ingrid Häußler klarigis multajn detalojn al la gastoj. Dum la tuta tago pluvetis kaj nun ĉiuj Halle-anoj esperas, ke tio ne estis malbona aŭguro.

ugg

ELSA

La 29-an de aprilo 2006 okazis en Bernburg la jarĉefkunveno de la Esperanto-Ligo Saksio-Anhaltio. Ĉijare ne estis elektoj; la aliaj formalaĵoj ne havis malregulaĵojn. La Esperanto-grupoj el Halle kaj Magdeburgo raportis pri la aktivaĵoj de la pasinta jaro kaj pri la planitaj por la nuna jaro.
Gerhard Hirschmann prezentis interesan prelegon pri lia vojaĝo al Sudafriko kaj pri la asocio de Mondcivitanoj.
La sekvonta jarĉefkunveno de ELSA estos la 28-an de aprilo 2007 en Bernburg en la urba informejo.

jogo

Raportoj pri la aliaj renkontiĝoj sekvos en la venonta eldono de ***Panoramo-Info***.
(2006-06-11 Händelfest, 2006-07-02 kradrostado en Bad Lausick, 2006-07-13 Spielehaus)

regulaj renkontiĝoj

Eo-grupo PANORAMO - Halle:
1-a mardo, 18.ooh: E.-Abderhalden-Str. 20
3-a mardo, 18.ooh: Bölbergasse
(restoracio "Zum Schwarzbrenner")
4-a mardo, 17.ooh: PIKo, informu vin

Eo-Gruppe Magdeburg:
ĉiu 2a mardo (ne en julio, aŭgusto),
Steubenallee 2

Eo-Klubo "Karapaco"
Zeitz: Dirk Bindmann, ✆+🖷 03441-273251
walden@t-online.de
Altenburg: kaiser-altenburg@t-online.de
✆ 03447-4012

eventoj

pliaj:
http://aliaflanko.de/kalendaro/
http://www.eventoj.hu

12.-19.08.2006 **Thomsdorf**
internacia tendumado
info@esperanto-nb.de

26.08.2006 **Wörlitz**
REVO Renkontiĝo en la parko de Vorlico
E-grupo Halle

29.09.-03.10.2006 **Herzberg**
Tutlandaj Padagogiaj Tagoj, **ICH**

04.-07.10.2006 **Herzberg**
Intensa trejnado en ĉiuj niveloj, **ICH**
poste GEFA-kongreso, GEFA-kultursemajno

21.10.2006 **Halle**
ANABEL Aŭtuna renkontiĝo
en la Fondaĵoj de Francke
E-grupo Halle

01.-03.12.2006 **Herzberg**
Intensa trejnado en ĉiuj niveloj, **ICH**

08.-10.12.2006 **Ústí nad Labem**
Kultura Festivalo, www.esperanto.cz
m.smyczka@seznam.cz

09.-12.12.2006
Ĉeĥa-Saksa Tago
kiz@kr-ustecky.cz

adresoj

DEB - Deutscher Esperanto Bund
Immentalstraße 3, 79104 Freiburg,
✆ 0761-289299, Info 0180-esperanto
(-3773726)
gea@esperanto.de http://www.esperanto.de

UEA - Universala Esperanto Asocio
Ĉefdelegito por Germanio:
d-ro Wolfgang Schwanzer,
Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz
✆ 06136-46232, http://www.uea.org

SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda
Peranto por Germanio: Jiri Proskovec,
Heimbaustraße 10, 44143 Dortmund
proskovec@aol.com

ELSA - E-Ligo Saksio-Anhaltio
Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, ✆ 03496-558517
joerg.gersonde@esperanto.de

E-Grupo "PANORAMO" Halle
Siegfried Linke, Fischerstecherstr. 23,
06120 Halle, ✆+🖷 0345-5500348,
halle-saale@esperanto.de
http://www.esperanto-halle.de

E-Grupo Magdeburg
Edith Plümecke, Simonstraße 15,
39114 Magdeburg, ✆ 0391-8117421
DDungert@t-online.de
http://www.beepworld.de/
members75/esperanto-dungert

E-Grupo Leipzig
Werner Geidel, Karlsruher Str. 5 d
04209 Leipzig, ✆ 0341-4118577

ICH Internacia Centro Herzberg
Peter Zilvar, Grubenhagenstr. 6,
37412 Herzberg, ✆+🖷 05521-5983
esperanto-zentrum@web.de
http://www.ic-herberg.de

Literaturdienst "ESPERO"
Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18
27333 Schweringen, ✆+🖷 04257-983223
RoBo.ESPERO@t-online.de

Bücherdienst/Libroservo
wolfgang.schwanzer@esperanto.de
http://www.esperanto-buchversand.de
✆ 06136-46232

PANORAMO-Info

Herausgegeben von der Esperanto-Gruppe „PANORAMO" Halle,
fina redaktoro: Jörg Gersonde, H.-Wäschke-Str. 31,
06366 Köthen, 03496-558517, joerg.gersonde@esperanto.de
Bankverbindung: August Grosch, Kto.: 480 144 352,
BLZ 800 537 62, Stadt- und Saalkreissparkasse Halle